

la Raŭpo *eble* diros ion atentindan, ŝi decidis resti. Dum kelkaj minutoj ĝi silente fumadis, sed en la fino malfaldis la brakojn, elprenis la pipon el la buŝo, kaj diris :—

“Vi do kredas ke vi estas ŝanĝita?”

“Mi timas ke jes, Sinjoro,” diris Alicio. “Mi hodiaŭ ne povas memori la aferojn kiel kutime, kaj mi ne restas samalta dum eĉ dek minutoj.”

— “Ne povas memori *kiajn* aferojn?” diris la Raŭpo.

Nu, ekzemple, mi penis diri “*Rigardu! Jen abel’ klopoda’* sed ĉio elvenis malsame,” Alicio respondis per tre melankolia voĉo.

“Deklamu ‘Patro Vilhelmo’” diris la Raŭpo. Alicio kunfaldis la manojn kaj komencis :—

Patro Vilé! Patro Vilé! (alparolas la filo)
Blankhara vi kaj maljunulo,
Staras *vi* sur la kap’ kiel korbbalancilo?
Ĉu ĝi taŭgas por okdeklarulo?

“Dum junec’,” Patro Vilĉo respondis al filo,
Mi ja timis difekton al cerbo.
Da cerbo nun havas mi malpli ol grilo,
Do tre ofte kapstaras sur herbo.

Maljunulo vi—tion denove mi diras,
Ankaŭ grasa ĝis plena sfereco,
Tamen elrenversite la ĉambron eniras!
Ho! de kie al vi l’elasteco?

Mi ja igis la korpon tre bone fl
(Li respondis tre vigle al filo
Per jena ŝmiraĵo—por *vi* aĉetel
Pobotele per unu spesmilo.

Maljunul’! (la demandon la fil
Ja sendenta al vi la makzelo.
Sed anseron kun ostoj, eĉ bek’
Jen vere mirinda muelo!

Dum juneco min logis la leĝos
Je l’edzino mi havis procesoj
Eĉ sur feron mi nun (dank’ al
Povus fari la makzelimpresoj

Tre maljuna vi estas! pro tiu
Senpoviĝas, ĉu ne, la okulo
Tamen jen balanciĝas angil’ su
Ho, klarigu, mirinda lertulo

Tri klarigojn vi havis (kolera
Vi forkuru, vi — fosu tomat
Mi ne plu da instruo . . . suf
Forpermeson ricevu aŭ — b

— “Ne prave!” diris la Raŭpo.
“Mi timas ke ne *tute*” diris Alicio.
kelkaj el la vortoj ŝanĝiĝis.”

“Malprave, de komenco ĝis fi
la Raŭpo. Sekvis kelkminuta
Unue parolis la Raŭpo. “I
vi deziras havi?” ĝi diris.

“Ho, pri grandeco, mi ne esta
rapide Alicio respondis, “sed v
ŝatas tiel ofte ŝanĝiĝi.”

— “Ne scias” diris la Raŭpo